

# LA PONTO

Tweemaandelijks tijdschrift van de Limburgse Esperantovereniging.



Jaargang 8, nummer 5 (47), januari-februari 2016  
Verschijnt op de eerste dag van iedere onpare maand.  
Erkenningsnummer: P808228  
V.U.: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81, B-3940 Hechtel-Eksel  
Tel. 011-73.20.47 – E-mail: [pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

# LA PONTO

Senpaga dumonata periodaĵo de la  
Limburga Esperanto-Asocio (L.E.A.)

Aperas la unuan de ĉiu nepara monato.

Limdato por artikoloj : la 1-a de ĉiu para monato

Jarkolekto 8, n-ro 5 (47): januaro-februaro 2016

Ĉiuj antaŭaj numeroj ankoraŭ haveblas ĉe [http://  
esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html](http://esperanto-forum.net/doc/LaPonto/archief.html).

Redaktoro: Pieter Jan Doumen, Peerderbaan 81,  
B-3940 Hechtel-Eksel - Tel. 011-73.20.47 Retadreso:  
[pieter-jan.doumen@telenet.be](mailto:pieter-jan.doumen@telenet.be)

---

## Eŭropa Unio kaj Esperanto

(De Eŭropese Unie en Esperanto)

**Ján Figel:** «*La Eŭropa Unio ne okupiĝas pri artefaritaj lingvoj*».

Pro la ĝenerala sinteno de EU al Esperanto ne estas miriga la vidpunkto pri «artefaritaj lingvoj», kiu estis fiksita en dokumento, ellaborita sub la respondeco de Ján Figel (Slovakio), komisionano, respondeca pri «edukado, klerigado, kulturo kaj multlingvismo» (2004-2007).

En *A New Framework Strategy for Multilingualism (Nova kadra strategio por multlingvismo)* oni legas sur p. 3, ke tute ĝenerale la alstrebinda kapablo kompreni aliajn lingvojn kaj komuniki per ili “kapabligas nin pli forte malfermi nin al la kulturoj kaj konceptoj de aliaj homoj, plibonigas la kognajn kapablojn kaj plibonigas la gepatralingvan kompetentecon de la lernanto».

Oni povas pridubi, ĉu la kompreno de aliaj kulturoj vere radikas en la ellerno de lingvoj de tiuj kulturoj. Tio ja signifus, ke la informoj pri alilingvaj kulturaj valoroj helpe de tradukoj, instruado, perado de amaskomunikiloj, elektronikaj instrumentoj ktp. estus sensignifaj.

Lige al tio «koncepto» sekvas la ŝajne ne tre grava piednoto 5, kiu estas tamen de fundamenta signifo. Tie oni ja legas:

«La kompreno de aliaj kulturoj radikas en la ellerno de la koncernaj lingvoj, kiuj estas esprimo de tiuj kulturoj. Pro tio la Komisiono ne subtenas la uzon de artefaritaj lingvoj, kiuj per defino ne havas kulturajn rilatojn».

Eblas komenti tion almenaŭ jene:

(1) La adjektivo ‘artefarita’ lige al lingvo havas nete negativan signifon.

(2) La pluralo indikas, ke oni ne distingas intercentoj da lingvoprojektoj (mortnaskitaj – daŭre aperas novaj, aparte en la interreto) kaj la

malmultaj kazoj, kiam projekto iĝis lingvo pro uzado fare de lingvokomununo. Tio vere signifas grado validas nur por Esperanto.

(3) Kiu «difinis» kion? Certe ne la fakuloj pri la temo: la interlingvistoj kaj esperantologoj!

(4) Jes ja, Esperanto havas kulturon. Oni ja povus aserti, ke neniu lingvo havas kulturon. La esprimo ke «lingvo havas kulturon», estas simpla metaforo, kiu subkonscie povas misgvidi. Jes, lingvo estas parto de homa kulturo. Sed tiun kulturon kreas, havas, portas, pludonas la lingvokomunumo. Kulturo reflektiĝas kaj konserviĝas i.a. en la lingvo. Pere de lingvoj oni pludonas prikulturajn informojn al nuntempuloj kaj estontaj generacioj. En la lingvo mem, aparte en la vortprovizo, konserviĝas prikulturaj informoj.

Laŭ tio Esperanto ne «havas» kulturon, sed jes ties lingvokomunumo. Kaj la anoj de tiu ĉi lingvokomunumo alportas elementojn de siaj naciaj kulturoj, de la monda kulturo kaj de la originala esperanta kulturo.

**Leonard Orban:** «*Ĉefe pro juraj kialoj Esperanto ne havas ŝancon*».

Leonard Orban (Rumanio), komisionano pri multlingveco (2007-2010) iniciatis vere interesan retan diskuton pri multlingvismo en EU («Kion vi pensas pri multlingvismo en Eŭropo? Ĉu en la ĉiutaga vivo vi havas problemojn pro lingvaj malfacilaĵoj?») En la diskuton ankaŭ partoprenis esperantistoj, iuj trafe, aliaj ne ĉiam tre diplomatie. Tamen Orban rimarkis, ke ekzistas la lingvo kun lingvokomunumo, kaj li sekve sentis la necesecon reagi ankaŭ pri Esperanto kaj interalie skribis jenon:

«En Eŭropa Unio multlingvismo estas difinita per la komunuma juro interne de unusencaj limoj. Lingvo povas fariĝi unu el la oficialaj lingvoj de EU, se plenumiĝis tri kondiĉoj:

(1) Ĝi devas esti oficiala lingvo, ankrita en la konstitucio de membroŝtato.

(2) La koncerna membroŝtato petas ĝian rekonon kiel oficialan lingvon por EU.

(3) La ceteraj membroŝtatoj tion unuanime akceptas.

Laŭ tiuj tri juraj kialoj Esperanto ne povas fariĝi «lingva franca» de Eŭropa Unio. Laŭ Orban plua kialo ligiĝas al la specifa naturo de Esperanto. Tia lingvo laŭ li «havas vortprovizon, kiu por la socia kaj kultura praktikoj havas nur malmulte da valoro... Necesus grandega praktika kaj financa streĉoj por krei tute novajn kompetentajn nomenklatureojn por artefarita lingvo...»

Kaj fine Orban aldonas interesan pluan kialon: «Mi ne tre favoras la ideon de *lingva franca*, ĉu ĝi estus Esperanto, la latina aŭ la angla. *Lingva franka*, historie rigardata, estas ja spontana socilingvistika fenomeno aŭ politika decido... Supozeble kelkaj esperantistoj en tiu ĉi forumo ne subtenas mian vidpunkton, sed mi pensas, ke ni devas daŭrigi la diskuton. Kelkajn argumentojn mi trovis tre informaj, sed mi ne povas subteni ĉiujn».

Orban almenaŭ reagis diferencige al la argumentoj de la esperantistoj, de kiuj li «trovis kelkajn tre informaj» kaj mencias pripensendajn argumentojn!

Pri la argumento lige al la vorttrezoro, li parte pravus. En kelkaj rilatoj, aparte se temas pri la faklingva funkcio, Esperanto ankaŭ estas subevoluinta. Aliflanke la fakleksiko de Esperanto por la diversaj disciplinoj principe kaj sufiĉe montras la taŭgecon de la lingvo por faka komunikado. Per sistema lingvoplanado, kiel ofte farata por aliaj «junaj» lingvoj, eblus adapti la leksikon al la modernaj bezonoj.

Kaj se temas pri lia vidpunkto pri *lingva franca*, nu, ĝi jam ekzistas en EU, kion li kompreneble devis ignori kun fermitaj okuloj. Al la argumentoj de Orban oni devus aldoni, ke la internacia politika klimato ankoraŭ ne favoras la uzon de neŭtralaj instrumentoj de sendiskriminaciigo, kiu klare reduktus la privilegiojn kaj avantaĝojn, pri kiuj la ŝtatoj ne facile rezignus.

Se estiĝos objektiva bezono kaj la politika volo, tiam ankaŭ troviĝos la financaj rimedoj kaj kreiĝos la bezonataj institucioj por lingvoplanado kaj aliaj agadoj (esploroj, instruado, pretigo de instrumaterialoj, pretigo de diversspecaj fakuloj, interpretistoj, tradukistoj, k.a.)

### ***Esperanto en la institucioj de Eŭropa Unio***

Lige al pli kaj pli evidenta lingva problemo en la Eŭropa Komunumo (poste Unio) jen kaj jen deputitoj de la Eŭropa Parlamento faris proponojn lige al la lingva reĝimo (rolo de la angla, lingva diskriminacio, ktp.) kaj en tiu kunteksto i.a. proponis konsideri la latinan aŭ Esperanton.

Ekzistas nun ĉirkaŭ 40 tiaj proponoj aŭ parlamentaj demandoj, de kiuj eble dunono ankaŭ mencias Esperanton.

Al tiuj proponoj apartenas la Raporto Dell'Alba (2004) en kies malneta versio pri multlingvismo en EU oni proponis konsideri eblan rolon por neŭtrala lingvo kiel Esperanto en la konservado de multlingveco en la Eŭropa

Parlamento. La plenara sesio de la Parlamento malaprobis la referencon al Esperanto la 1-an de aprilo 2004, sed proksimume 43% de la ĉeestantaj parlamentanoj volis gardi ĝin.

En la «Raporto Mouro» (2009), ankaŭ pri multlingveco, la slovena Ljudmila Novak proponis serioze konsideri Esperanton. Ankaŭ tiun proponon oni malakceptis

### ***Apartaj aranĝoj en Parlamento kaj Komisiono***

Foje membroj de Eŭropa Esperanto-Unio kaj esperantistoj laborantaj en la strukturoj de EU sukcesis iniciati kelkajn aranĝojn, en kies kadro oni diskutis pri la lingvoproblemo kaj, lige al ĝi, ankaŭ povis prezenti Esperanton. Tio okazis kvarfoje.

La «Laborgrupo pri la lingva problemo en Eŭropa Unio» sukcesis okazigi, kune kun la bavara Hanns-Seidel-Stiftung, kolokvon pri la temo (tradukita) «La interkomunikado kaj la lingvoproblemo en la Eŭropa Komunumo: ĝis kiu amplekso planita lingvo povus kontribui al ĝia solvo?» Prelegis i.a. Hans Erasmus, Helmar Frank, Claude Piron, Klaus Schubert, Detlev Blanke, kaj reprezentantoj de aliaj planlingvoj kaj anoj de tradukaj servoj.

Same en Bruselo okazis konferenco, organizita de la Komuna Tradukista kaj Konferenca Servo de la Eŭropa Komisiono pri la temo «Tradukado kaj kvalito: novaj defioj». Tie la interlingvistoj Klaus Schubert kaj Mark van Oostendorp povis prezenti la projekton *Neighbour* pri propedeŭtiko kaj *Relais* (Esperanto kiel ĉefkabineta lingvo).

Ankaŭ en la parlamentejo de Bruselo oni diskutis en 2003 pri la temo «Kian lingvo-politikon apliki por la multlingva Eŭropa Unio?» kaj prelegis i.a. Hans Erasmus kaj Vera Bandarovska-Frank pri la eventuala rolo, kiun povus ludi Esperanto en la Eŭropa Unio.

Apartan serion da aranĝoj, destinitaj al gejunuloj kiuj volas konatiĝi kun la parlamenta laboro, ofertas Euroscola, en kiu ekde 2011 ankaŭ partoprenis kaj aktivis junaj esperantistoj. En 2001 la Esperanto-delegacion konsistigis 175 junuloj el 7 landoj. (*Detlev Blanke*)

### ***Spertoj kaj ideoj pri rejuniĝo el 13 landoj (Ervaringen en ideeën tot verjonging uit 13 landen)***

Ekstrema internacieco konstateblis ĉe la partoprenintoj de la 17-a Seminario pri Aktuala Maturiĝo, kiu hodiaŭ finiĝis en la nordhungara urbo Eger. Trafe en tiu 17-a AMO rolis 17

regisitraj seminarianoj, kiuj venis el ne malpli ol 13 landoj: Aŭstrio, Brazilo, Britio, Francio, Germanio, Hispanio, Hungario, Italio, Kanado, Nederlando, Serbio, Slovakio kaj Ukrainio.

Kiel imageble, pro la gastiga aranĝo de JES (Junulara Esperanto-Semajno), la plimulto de la seminarianoj estis junuloj, kio plene utilis por trakti la seminarian temon 'Junigi la Komunumon'. Ne mankis reprezentantoj de la junulara movado: aktive partoprenis la prezidanto de TEJO, Michael Boris Mirandola, kaj la estrarano pri landa agado, Juliana Evandro. Gvidis la seminarion Stefan MacGill (HU) flanke de UEA, kaj Enric Baltasar (ES) flanke de TEJO

La seminaria temo estis difinita per artikolo en la novembra numero de la revuo *Esperanto*. Tio ĉefe temis pri la fendaĵoj por TEJO kaj UEA, kiujn la seminario ne povis tiagrade affronti, ĉar malmultaj el la partoprenantoj aktivas internacie. Do, tiu temaro restos por pli specifaj laborkunsidoj inter TEJO kaj UEA.

La diskutoj centriĝis pli pri la stato kaj defioj de la landaj kaj lokaj agantoj, kiujn ĉiuj iugrade spertis. Plie, ni ankaŭ aŭskultis raportojn de junuloj el la landoj de la Sudorienta Regiono de Eŭropo (SORE), sed ĉar la plimulto de la seminarianoj ne venis el tiu regiono, la diskutoj estis larĝigitaj por trakti ankaŭ la junularajn movadojn en la diversaj mondopartoj. Konstato, aperanta el tiuj raportoj de SORE, nome la baza malhelpo al la vastigo de la junulara agado estas la manko de informoj pri Esperanto, kiuj devas atingi la gejunulojn. Dum homoj en tiu mondoparto el pli aĝaj generacioj eventuale aŭdis pri Esperanto (eĉ eble konis esperantis-tojn), inter junuloj la scinivelo ege malaltas. Sen solvi tiun problemon, malmultas la ebloj pluri al pli altaj niveloj. *Stefan MacGill*

## **La lavendo** *(De lavendel)*

En la floringvaĵo lavendo signifas: «Respondu min». En pli tradicia aŭ pli amika rilato, la lavendo estas simbolo de tenereco, eble kaŭze de sia bluite malva koloro, sia parfumo kaj siaj kvietigaj kaj antisepsaj kvalitoj.

La lavendaj nuptoj simboligas 46 jarojn de geedziĝo en la franca folkloro.

La blua koloro de sia vesto estas miridaĵo el la sudo, ĝia dolĉa parfumo estas donaco de la dioj al Provenco.

Estas tri specoj de lavendo en Francio, ege similaj pro ĝia formo kaj ĝiaj proprecoj: la

lavendo «stoeŝas», la oficina lavendo kaj la spiklavendo.

La unua, tute ornamita per blankaj veluraj folioj, disvastigas sur la sekaj garigoj de silicaj terenoj siajn admirindajn purpurajn violnuncajn florojn. Ĝi estas strikte limigita al la mediteranea regiono.

La dua speco tegas per integraj tapiŝoj ne nur la mediteranean regionon, sed ankaŭ Cevenojn, Daŭfenion kaj Pirineojn ĝis la lionaj montoj.

La altituda vario, nomita la malgranda aŭ maldika lavendo, estas pli estimata ol tiu de la ebenaĵoj, kaj estas nomata bastarda lavendo, dika lavendo, «spiguro» aŭ «lavendino».

La tria speco, kiu atingas la altecon de unu metro, posedas tre larĝajn foliojn kaj kreskas norde de la Altaj Alpoj.

Se vi deziras havi antaŭvertajn songojn, vi masaĝu la frunton kaj la tempiojn per dispremitaj freŝaj lavendofloroj antaŭ ol endormiĝi. Oni ankaŭ diras en Provenco, ke homo kiu manĝas lavendoflorojn en vinberejo kiu estas forlasita almenaŭ dudek jarojn, havas multe da ŝanco vidi fantomojn..

Ĝi parfumas, sed ankaŭ desinfektas, cikatrigas, kvietigas, stimulas, fortigas kaj reguligas jam de jarmiloj.

Antaŭ ol pripensi krei bansalojn, senodorigilojn kaj insektmortigilojn, kiuj protektas la vestaĵojn aŭ garantias «la parfumitan morton de la pediko», ĝi utilis al la Romianoj por pretigi siajn banojn.

Cetere ĝia nomo devenus de la latina vorto «lavare», lavi.

Oni lokis saketojn kun lavendo en la kestojn kaj la ŝrankojn, oni utiligis ĝin, sub formo de oleo por kalkoŝmiri la litlignon por elpeli la cimojn, kaj oni aplikis ĝin sur la kapon de la infanoj por mortigi pedikojn kaj lentojn, ja ankaŭ por malkovri la ekziston de la mikrobojn, kiuj responsas pri infektadoj kaj, antaŭ ol eltrovi la kontraŭvenenajn serumojn, oni uzis ĝis, sub formo de oleo aŭ tinkturo aŭ esenco por bandaĝi la soldatojn vunditojn per klingarmiloj, kaj ankaŭ por prizorgi la brulvundojn. La ĉasistoj de la regionoj, kie ĝi kreskas, savis la vivon de siaj hundoj, morditaj de vipero, tuj frotante la vundon per manpleno da lavendo, ĉifita inter la fingroj.

Eĉ se oni ligas la lavendon kun Provenco, sciu, ke la lavendo estas ŝtaŭdo<sup>1</sup>, kiu egale kreskas tre bone en la tuta Francio, ĉiukaze ĝis

---

<sup>1</sup> Arbusteto, duonligneca planto aŭ plurjara herbo

1000 metrojn da alteco, sur sekaj kaj bonaj sunplenaj terenoj.

Unufoje pli, la modernaj analizoj aperigis, ke empirismo pravis, kaj ke la esenca oleo premi-ta el lavendo, estas potenca antisepsilo. Ĝi mortigas per dozeroj de 5 ĝis 0,2 % la bacilon de difterio, tiun de tifoido, la bacilon de Koch, tute kiel la streptokokojn kaj la pneŭmokokojn. Samtempe lavendoleo estas eminenta neŭtrali-ganto de venenon, kio pravigas la gravecon, kiun atribuas al ĝi Sankta Hildegarde, benedik-tina abatino, tiel famkonata pro siaj vizioj kaj scioj. Ŝi dediĉis al la lavendo tutan ĉapitron en sia fama traktaĵo pri kuracarto.

Lavendo estas ankaŭ antispasma rimedo, kiu utilas por mildigi la tusadon kaŭzitan de gripo, kokluŝon kaj astmon. Ĝi favoras dormadon, kvietigas hemikraniojn, kapdolorojn kaj verti-ĝojn. Diureza kaj ŝvitiga, ĝi malpezigas reŭma-tismojn. Ĝia esenco, miksitita kun iom da alko-holo, estas efika stimulantito, per frotado, de la sangcirkulado. Miksitita kun vinagro, ĝi ankaŭ taŭgas por lavpurigi la harojn.

Ekde la antikveco, lavendo estas uzata por lavi kaj parfumi tolaĵojn. Grekoj kaj romanoj uzis ĝin ankaŭ por parfumi la banakvon.

Oni atribuas al ĝi ankaŭ protektajn kaj puri-gajn proprecojn. Tiamaniere, okaze de la gran-daj pestepidemioj, estis rekomendite ĉiam teni kelkajn lavenderojn sur si. Nuntempe oni uzas lavendon precipe por parfumoj, lavtolaĵoj kaj ankaŭ por gastronomiaj produktoj.

Oni inventaras ĉirkaŭ 4000 kultivatajn hekta-rojn da kampoj en la kvar produktantaj depart-mento, nomj Dromo, Altaj Alpoj, Vaŭkluzo kaj la Alpoj en la Alta Provenco.

(*Espéranto en Marche*)

### **Geografia studo de cent UK-oj (*Aardrijkskundige studie van 100 UK's*)**

Rigardante la informojn pri la Universalaj Kongresoj, oni ne povas ne rimarki, ke en kel-kaj regionoj UK-oj ne sufiĉe ofte okazas, kaj en kelkaj aliaj eĉ nesufiĉege. Al tiu lasta gupo apartenas la nord-amerika kontinento. En la tuta granda kontinento okazis nur kvar UK-oj, kaj du el ili antaŭ la jaro 1920 (en la orienta parto okazis nur unu UK: tiu de 1910 en Va-singtono, kiun ĉeestis d-ro Zamenhof.

Lastfoje UK okazis en Nord-Ameriko en 1984 en Vankuvero (Kanado).

Jen la statistikoj pri la UK-oj :  
- de 1905 ĝis 2015: en Eŭropo 83, en Azio 6, en Nord-Ameriko 4, en Sud-Ameriko 3, en

Kariboj 2, en Okcidenta Azio 1, en Oceanio 1. Entute 100.

- de 1958 ĝis 2015: en Eŭropo 20; en Nord-Ameriko 0, en Sud-Ameriko 2, en Kariboj 2, en Okcidenta Azio 1, en Oceanio 1. Entute: 31.  
(*Espéranto en Marche*)

## **Lidja Zamenhof**

En la *Galerio de la Zamenhofoj*, eldonita de *Heroldo de Esperanto* en 1925, la tiam konata varsovia esperantisto Edvardo Wiesenfeld karese nomis Lili la plej junan filinon de d-ro Zamenhof. Sed kiu estis ŝia vera antaŭnomo: Lidja? Lidia?

La oficialaj dokumentoj montritaj de Adolf Holzhaus en la *Granda Galerio Zamenhofa 2* (1978), sur la paĝo 116-a ĝis la 119-a, atestas, ke ŝi nomiĝis *Lidja Zamenhof* (Stafeto, 1980). Isaj Dratwer, tiam en Israelo, sed konata Espe-rantisto en Varsovio antaŭ la milito, klarigis, ke ŝi skribas sian nomon kiel «Lidia» pro la intertempa okazinta reformo de la pola orto-grafio. Laŭ de ŝi datitaj manuskriptoj, kiujn mi vidis, la ŝanĝo okazis dum la lastaj tagoj de januaro aŭ la komenco de februaro 1937, kiam ŝi estis en Francio. Ne pro korinklino, sed por ne kontraŭstari la polajn aŭtoritatulojn, kio estis preferinda, Lidja aplikis al si la novan ortografion de sia nomo, diferenca de tiu uzata de ŝiaj gepatroj, kiuj cetere nomis ŝin «Lilka».

Pro tio mi ĉiam skribas «Lidja». Aliaj, inter kiuj estas Isaj Dratwer kaj Zofia Banet-Forna-łowa, sentimentale faras la samon. Menciindas, ke sur informiloj, raportoj ktp. pri ŝiaj grand-nombraj kursoj en Francio oni plej ofte trovas la francigitan formon «Lydia».

La anglan lingvon mi tute ne scipovas, kaj sekve la originan verkon de Wendy Heller, «Lidia», mi neniam legis; mi nur legis la espe-rantlingvan version.

Wendy Heller multe serĉis kaj vojaĝis sur la spuroj de Lidja por verki sian libron, sed ŝi ne esploris ĉiujn fontojn aŭ ne ĉion eltiris el ili, male al tiuj pri bahaismo. Ŝi rakontas, laŭateste de gelernintoj de Lidja, anekdotojn pri la kur-soj kaj la restadoj de Lidja en Liono. Kiam la aŭtorino vizitis Lionon, André Védrine ŝia-intence arigis la de li konatajn lionajn esperan-tistojn de tiu tempo. Ŝi kolektis tiom da atestoj kaj materialon, ne nur en Liono (Lyon), ke ŝi devis mul-ton forigi el la unua manuskripto laŭpete de la eldonisto en Oksfordo, kiu estis specialigita pri bahaaj eldonoj (leteroj de la 22-a kaj la 30-a de julio 1997 de A. Védrine). Sed

por mi estas evidente, ke la parto pri Lidja kiel internacia instruistino de Esperanto multege suferis, dum la bahaisma flanko superas ĉion tra la tuta libro.

Laŭ letero de Lidja de la 10-a de februaro 1937 al Erika Dietz de Strasburgo, post la tradicia Cseh-kurso, ŝi povis gvidi daŭrigan kurson laŭ sia propra metodo, kiun ŝi spertis en Nantezo kaj Liono.

Kiam post longa suferado venis la vivofino de Marie Borel, kun kiu Lidja havis kvazaŭ filinajn rilatojn, ŝi rapidis al la malsanulino. Ĝis la 16-a de julio 1937 ŝi instruis en Parizo, kiun ŝi rapide forlasis. La 23-an de julio, en la katolika preĝejo Sankto Andreo en Liono, Lidja eldiris la funebran paroladon kaj akompanis la familianojn de la mortintino al la entombigo en Arlezo. La nekuracebla malsano kaj morto de Marie Borel je la aĝo de 54 jaroj, estis tre grava sortobato por Lidja, ne fremda al ŝia decido forlasi la malnovan kontinenton.

En 1950, cele al la aktualigo de *Enciklopedio de Esperanto*, Émile Boirel petis, ke oni tiel kompletigu lian propran biografion en la unua eldono, tiu de 1933 :

«Lia edzino estis unu el la fondintinoj de la virina societo Unuiĝo de Esperantistaj Virinoj (UDEV). Ŝi ofte kunlaboris kun Lidja Zamenhof por tiu movado.»

Je sia emeritiĝo, Émile Boirel retiriĝis en Arlezon kaj restis fidela, aganta esperantisto ĝis sia morto en 1959.

En sia *La familio Zamenhof* Zofia Banet-Fornalowa laŭdas la prilaboraĵon de Wendy Heller. Ŝi mem laŭdinde biografias Lidjan en sia verko. En ĝi ŝi dediĉis la plej grandan nombron da paĝoj al Lidja, nome 24, tiam konigante al multaj precizan informon pri la perejo de Lidja danke al la artikolo de Semer: *La lastaj tagoj de Lidja Zamenhof*, dankinda kontribuo kaj plia dolora paĝo en nia kaj la monda historio. Danke al la klopodoj de Josef Ŝemer la nomoj de Lidja, de ŝiaj gefratoj, Adam kaj Sofia, de sia onklino Ida Zimmerman-Zamenhof, de ŝiaj aliaj familianoj kaj esperantistoj, estas poreterne memorige skribitaj en *Jad Vaĉem*, la listo de la viktimoj de la holokaŭsto. En alia verko sia, Zofia Banet-Fornalowa omaĝis al ses emblemaj figuroj de polaj judaj esperantistoj martire murditaj dum la horora holokaŭsto, kiu celis ekstermi la senkulpan judan popolon kaj genton, al kiuj apartenis la familio Zamenhof.

En julio 1997 mi ricevis leteron el Japanio de Masayosi Higasida:

«Mi nuntempe kolektadas la materialon pri Lidja Zamenhof, ĉar mi forte deziras kompili ŝian Antalogion, inkluzive de ŝiaj paroladoj, se eblas. Mi deziras viziti iom poste Lionon, kiun Lidja, onidire, nomis sian duan hejmlokon.»

Zofia Banet-Forlanowa jam delonge rilatis kun li pri tiu temo, ankaŭ Bernhard Westerhoff, sekretario de la Bahaa Esperanto-Ligo (BEL). Dekomence estis la intenco honorigi la memoron de Lidja en 2004, jaro de la centjariĝo de ŝia naskiĝtago. Iom post iom BEL kunordigis la taskon, ricevinte la peton de Higasida, ke la antologio neniel fariĝu sole bahaisma. Oni plu faris la laboron jen kun espero jen kun scepticismo rilate al la eldono.

Kolekti kaj pretigi ĉion de Lidja Zamenhof - referaĵojn, paroladojn, artikolojn, korespondadojn, tradukaĵojn ktp. - estis granda laboro! Tiom da tekstoj necese kondukis al selektado, kondiĉe ke, kiel tute prave atentigis Masayosi Higasida, estu ĝusta ekvilibro. Nu, eldone de Flandra Esperanto-Ligo (FEL), aperis en julio 2009 la prilaboraĵo sub la titolo *Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj, la originalaj verkoj de Lidia Zamenhof*.

Jean Amoureux (el *La Gazeto*)

### **Kurkumo, natura kuracilo**

(*Kurkumo, natuurlijk geneesmiddel*)

Dum la lastaj jaroj multaj studoj provis, ke la flava kurkumradiko bone taŭgas por bremsi inflamojn. Precipe ĉe muskol- kaj artiklendoj ĝi estas uzata kun multa sukceso, sed ankaŭ ĉe aliaj sur inflamo bazitaj afekcioj kiel kor- kaj angimalsanoj, hepat-afeksioj, deprimoj kaj intestmalsanoj tiu ĉi flava multflanka rimedo estas tre utila.

Tre interesa estas la inflamrepuŝa efiko de kurkumo sur muskoloj kaj artikoj: tute kiel certaj medikamentoj ĝi bremsas la tiel nomatajn inflamoj COX-2. La agado de kurkumo estas pli malrapida ol tiu de medikamentoj, sed atingas la saman nivelon kaj ne kondukas al stomak- kaj intestproblemoj aŭ al aliaj kromefikoj. Tiel kurkumekstrakto plialtigis la sendoloran promenkapablon de persono suferanta pro artrozo per 200% post unu monato kaj per 245% post tri monatoj.

Kurkumo plibonigas ankaŭ la hepatfunkcion. La hepato produktas pli grandan kaj pli bonkvalitan fluantan galon, kiu favoras la grasdigeston kaj preventas la formadon de galŝtonojn. Ankaŭ la maltoksado de la hepato estas favorata, kaj la hapatteksaĵo estas pli bone protektata kontraŭ toksaj materioj kiel aldonaj

kaj medivenenoj. Kurkumo devas tamen esti evitata en la kazo de enfiksitaj galŝtonoj.

Pro la supre menciita optimuma grasmatabolo kurkumo povas ankaŭ malpliigi la nivelon de kolestrola kaj trigliceridoj. Aldonu al tio la inflamrepuŝan efikon sur la angivandoj kaj la naturan diluan funkcion, kaj vi komprenas, ke bona kurkumekstrakto ankaŭ protektas vin kontraŭ kor- kaj angimalsanojn.

Kurkumo plibonigas la kvaliton de nia imuneco. Tiel ĝi stimulas la faradon de antikorpoj ĉe viralaj inflamoj kaj bremsas la *Helikobakter pylori*, la bakterio, kiu ofte estas la kaŭzo de stomakaj ulceroj. Kurkumo estas ankaŭ multpromesa bremsanto de inflammalsanoj de la intesto (*Crohn, Colitus ulcerosa*). Finfine oni vidas ĉe bestostudoj kaj ĉe ĉelkulturoj, ke kurkumo ankaŭ helpas protekti kontraŭ kancero.

Kurkumo havas ankaŭ protektantan influon sur la cerbo. La antaŭan jaron studo montris, ke en kazo de deprimado ĝi efikis tiel bone kiel la medikamento fluoksetino kaj estis bone tolerata. Kurkumo ankaŭ kontribuas al la prevento de la malsano de Alzheimer.

La kontraŭinflamaj kurkuminoidoj en kurkumo havas unu malvantaĝon: ili ne estas tiel bone ensorbaj. Tiu kiu deziras konsumi normalan kurkumpulveron, devas konsumi grandajn kvantojn da ĝi. Por optimuma efiko oni do bezonas kurkumpreparaĵon, kies kurkuminoidoj povas esti bone absorbitaj. Tio eblas per kombino kun fosfatidilholino el lekitino, kio altigas la absorbeblon de la kurkuminoidoj per la faktoro 29! (El: *Maar natuurlijk*)

## La fatalisto

*Novelo de M.J. Lermontov (1814-1841)*

Iam mi pasigis du semajnojn en kozaka urbo ĉe la maldekstra flanko de la armeo. Tie garnizonis ankaŭ infanteria bataliono. La oficiroj kolektiĝis laŭvice ĉe iu el la kamaradoj, kaj vespere oni ludis kartojn.

Foje, kiam bostono jam enuigis nin kaj ni formetis la kartojn, ni restis ankoraŭ longan tempon ĉe majoro S.; kontraŭkute nia konversacio estis interesa. Oni diskutis pri tio, ke ankaŭ inter ni troviĝas multaj adeptoj de la mohametana kredo, laŭ kiu la homa sorto jam estas antaŭdestine skribita en la ĉielo; oni rakontis ĉiajn neordinarajn okazaĵojn *pro* kaj *contra* la temo.

«Ĉio ĉi, sinjoroj, nenion pruvas,» diris la maljuna majoro, «neniu el ni ja estas vidinto de

tiuj strangaj aferoj, per kiuj ni konfirmas niajn opiniojn!»

«Certe neniu,» diris multaj, «sed ni aŭdis de fidindaj homoj, ke...»

«Tio ja estas sensencaĵo!» diris iu. «Kie estas tiuj fidindaj homoj, kiuj vidis la liston, sur kiu estas fiksita la momento de nia morto?... Kaj se efektive estas antaŭdestino, tiam pro kio ni estas dotitaj per libera volo kaj prudento? Kial ni devas respondi pri niaj agoj?»

En tiu momento oficiro, kiu sidis en angulo de la ĉambro, leviĝis kaj, malrapide irinte al la tablo, ĉirkaŭprenis nin ĉiujn per trankvila kaj solena rigardo. Li estis de serba deveno, kion oni ja komprenis laŭ lia nomo, Vuliĉ.

La eksterajo de ĉefleŭtenanto Vuliĉ estis plene konforma al lia karaktero. Alta kresko, brunkolora vizaĝo, nigra hararo, nigraj, akraj okuloj, granda sed simetria nazo - karakteriza trajto de lia nacio - malgaja kaj malvarma rideco, ĉiam eraranta sur liaj lipoj, - ĉio kvazaŭe kuniĝis por aspektigi lin kiel neordinaran estaĵon, nekapablan partopreni en la pensoj kaj pasioj de tiuj, kiujn la sorto faris liaj kamaradoj.

Li estis kuraĝa, parolis malmulte, sed akre. Al neniu li konfidis la sekretojn de sia animo kaj sia familio, preskaŭ tute ne trinkis vinon kaj neniam amindumis junajn kozakinojn, kies ĉarmo oni malfacile komprenas, se oni ne vidis ilin. Oni tamen diris, ke la edzino de la majoro ne estis indiferenta al liaj esprimplenaj okuloj, sed li vere koleris, kiam oni aludis pri tio.

Estis nur unu pasio, kiun li ne sekretigis - pasio al ludo. Ĉe la verda tablo li forgesadis ĉion, kaj ordinare malgajnis; sed konstantaj malsukcesoj nur incitis lian obstinon. Oni rakontis, ke foje dum milita ekspedicio, dum nokta ludo sur kuseno, li havis la bankon de la karto kaj estis ekstreme bonŝanca. Subite aŭdiĝis pafoj, oni ektamburis alarmon, kaj ĉiuj eksaltis kaptontaj armilon.

«Ludu *va banque!*» ne leviĝante kriis Vuliĉ al unu el la plej pasiaj ludantoj. *Va banque* signifis riski la tutan sumon de la banko: aŭ malgajni ĝin aŭ duobligi la bankon.

«Mi ludas sepon,» iu diris, forrapidante.

Malgraŭ la ĝenerala tumulto Vuliĉ daŭrigis meti kartojn; la sepo gajnis.

Kiam li venis en la viĉojn, tie jam regis vigla interpafado. Vuliĉ atentis nek pri kugloj nek pri ĉeĉenaj sabroj; li serĉis sian bonŝancan kontraŭulon.

«La sepo gajnis!» li kriis al la ĝajninto, ekvidinte lin fine de la antaŭa vico de la pafantoj,

kiuj ĵus komencis elarbarigi malamikojn, kaj alproksimiĝinte, li prenis el sia monujo kelkajn monbiletojn kaj donis ilin al la feliĉulo, malgraŭ ties kontraŭdiroj, ke pago tie ne konvenas. Plenumante ĉi tiun malagrablan devon, kaj ĝis la fino de la batalo, li plej trankvilanime interpafadis kun la ĉeĉenoj.

Kiam la ĉefleŭtenanto venis al la tablon, ĉiuj eksilentis, atendante de li neordinaran ekstra-vagancon.

«Sinjoroj!» li diris (lia voĉo estis trankvila, kvankam en tono malpli alta ol kutime), «sinjoroj, pro kio tiuj vanaj disputoj? Vi deziras pruvojn; mi proponas, ke oni en sia propra persono ekzameni, ĉu homo povas arbitre disponi pri sia vivo, aŭ ĉu eble al ĉiu el ni anticipi estas destinita fatala minuto... kiu volas?»

«Ne mi, ne mi!» eksonis de ĉiuj flankoj. Jen strangulo! Kio venis en lian kapon?»

«Mi proponas veton,» mi diris ŝerce.

«Kiun?»

«Mi asertas, ke ne estas antaŭdestino,» mi diris, elŝutante sur la tablon proksimume du dekojn da dukatoj. «Ĉion, kio estis en mia poŝo».

«Mi akceptas,» respondis Vuliĉ per obtuza voĉo. «Majoro, via moŝto estos arbitracianto. Jen dekkvin dukatoj. Kvin dukatojn vi ŝuldas al mi, kaj estu tiel kompleza aligi ilin al ĉi tiuj.»

«Bone,» diris la majoro, «sed verdire mi ne komprenas, kio okazas kaj kiel vi solvos la disputon.»

Vuliĉ silente eniris la dormoĉambron de la majoro. Ni sekvis lin. Irante al la muro, sur kiu pendis armilaro, li senelekte prenis de la najlo unu el la diverskalibraj pistoloj. Ni ankoraŭ ne komprenis lin, sed kiam li streĉis la ĉanon kaj ŝutis pulvoron sur la pfanon, tiam, nevole ekkriante, multaj el ni kaptis lin ĉe la brako.

«Kion vi volas fari? Aŭskultu, tio ja estas frenezaĵo,» oni kriis al li.

«Sinjoroj,» li diris malrapide kaj liberigante sian brakon, «kiu anstataŭ mi bonvolas pagi dudek dukatojn?» Ĉiuj eksilentis kaj eliris.

Vuliĉ revenis en la alian ĉambron kaj sidiĝis ĉe la tablon. Ĉiuj sekvis lin. Per signo li invitis nin sidiĝi ĉirkaŭ la tablon. Oni silente obeis: en tiu minuto li posedis iun misteran potencon super ni. Mi fikse rigardis lin, sed per trankvilaj senmovaj okuloj li renkontis mian ekzamenantan rigardon, kaj liaj palaj lipoj ekridetis. Sed malgraŭ lia trankvilo, ŝajnis al mi, ke mi legas signon de la morto sur lia pala vizaĝo. Mi

mem rimarkis – kaj multaj malnovaj militistoj konfirmas tion – ke ofte sur la vizaĝo de la homo, mortonta post kelkaj horoj, troviĝas ia stranga signo de lia neevitebla sorto; kaj spertaj okuloj kutime ne eraras.

«Vi mortos hodiaŭ!» mi diris al li. Li tuj turnis sin al mi, sed respondis malrapide kaj trankvile:

«Eble jes, eble ne...»

Poste turnante sin al la majoro, li demandis, ĉu la pistolo estas ŝargita. La konsterniĝinta majoro ne precize memoris tion.

«Sufiĉas, Vuliĉ!» iu ekkriis, «certe ĝi estas ŝargita, kiam ĝi pendis ĉe la lito. Pro kio nun ŝerci?...»

«Malsaĝa ŝerco!» daŭrigis alia.

«Mi vetas: kvindek rublojn kontraŭ kvin, ke la pistolo ne estas ŝargita!» kriis tria.

Oni faris novan veton.

Tiu longa procedo tedis min.

«Aŭskultu,» mi diris, «aŭ mortpafu vin, aŭ rependigu la pistolon sur sian lokon, kaj ni iru dormi.»

«Kompreneble,» ekkriis multaj, «ni iru dormi.»

«Sinjoroj, mi petas vin, ne forlasu viajn sidlokojn!» diris Vuliĉ, metinte la faŭkon de la pistolo kontraŭ sian frunton.

Ĉiuj kvazaŭe ŝtoniĝis.

«Sinjoro Peĉorin,» li aldonis, «prenu karton kaj jetu ĝin supren.» (*Daŭrigote*)

## Aktivaĵoj de LEA

### Estintaj aktivaĵoj:

Novembro 2015: Disdonante fotojn, An Olij-slagers paroligis la ĉeestantojn pri tio kion ili vidis sur ili. Ĉeestis la kunvenon la sekretariino de FEL, Nicky Janssen kaj alia membro de la Antverpena klubo.

Decembro 2015: La 17-an kunvenis dek esperantistoj en la restoracio Torenhuis en Peer por rememori la naskiĝtagon de d-ro Zamenhof. Ĉiuj manĝis laŭ la menukarto kaj tre agrable konversaciis. Ĉeestis Nicky Janssen kaj Ivo Vercammen, ŝia edzo kaj prezidanto de FEL.

### Estontaj aktivaĵoj:

Januaro 2016: Henri Schutters prezentos la filmon «Esperanto 125-jara».

Februaro 2016: Karsten (aŭ Ben) rakontos pri siaj spertoj kun Esperanto.



## Enhavo de tiu ĉi numero de ‘La Ponto’:

- Paĝo 2: Kolofono  
Eŭropa Unio kaj Esperanto (1) (La Gazeto, Francio)  
Paĝo 3: Spertoj kaj ideoj el 13 landoj (Stefan McGill)  
Paĝo 4: La lavendo (el Esperanto en marche)  
Paĝo 5: Lidja Zamenhof (Jean Amouroux):  
Paĝo 6: Kurkumo, natura kuracilo (el Maar natuurlijk)  
Paĝo 7: La fatalisto (novelo de M.J. Lermontov) (Rusaj noveloj no. 2))  
Paĝo 8: Aktivaĵoj de la Limburga Esperanto-Asocio  
Paĝo 9: Enhavo de tiu ĉi numero

*Al ĉiuj legantoj kaj legantinoj de La Ponto mi tutkore deziras feliĉan, prosperan kaj sanan novan jaron 2016!*

---

### Lernu Esperanton!

Kiom da fojoj ni ne staras en fremda lando kun frostinta lingvo, ne kapablaj paroli la lingvon de la tieaj homoj? La mondo bezonas supernacian, duan lingvon. Sola Esperanto ofertas vere demokratian solvon por tiu problemo, ĉar per ĝia ekonomia kaj politika neŭtraleco ĝi metas ĉiujn homojn sur egalan nivelon. Ĝi estas ne nur la plej facila lingvo en la mondo kaj la sola, kiu estas tute regula – ĝia grammatiko ne havas esceptojn –, sed ĝi pledas ankaŭ por egalaj rajtoj por ĉiuj popoloj. “Kiom da lingvoj oni parolas, tiom da fojoj oni estas homo”, diris imperiestro Karlo V. Tamen homo bezonas, ekster sia dialekto, nur du lingvojn: sian nacian lingvon kaj Esperanton. Esperanto ne volas anstataŭigi la naciajn lingvojn, kiel pensas multaj homoj, sed jes servi kiel komunikilo inter homoj, kiuj ne havas la saman gepatran lingvon.

### Leer Esperanto

Hoe vaak staan wij niet in een vreemd land met de mond vol tanden, niet in staat de taal te spreken van de mensen aldaar? De wereld heeft een supranationale, tweede taal nodig. Alleen Esperanto biedt een echt democratische oplossing voor dat probleem, want door zijn economische en politieke neutraliteit plaatst het alle mensen op gelijke voet. Het is niet alleen de eenvoudigste taal ter wereld en de enige die volledig regelmatig is – haar grammatica heeft geen uitzonderingen –, maar zij pleit ook voor gelijke rechten voor alle volkeren. “Zoveel talen als men spreekt, zo vaak is men mens,” zei keizer Karel V. Nochtans heeft een mens behalve zijn dialect maar twee talen nodig: zijn nationale taal en Esperanto. Esperanto wil niet de nationale talen vervangen, zoals sommigen denken, maar wel dienen als communicatiemiddel tussen mensen die niet dezelfde moedertaal hebben.

### Apprends l’Espéranto!

Combien de fois ne restons-nous pas bouche bée dans un pays étranger, incapables de parler la langue des indigènes ? Le monde a besoin d’une langue supranationale. Seul l’Espéranto offre une solution vraiment démocratique à ce problème, car, par sa neutralité économique et politique, il met tous les hommes sur un pied d’égalité. Ce n’est pas que la langue la plus simple au monde et la seule qui soit tout à fait régulière – sa grammaire n’a pas d’exceptions –, mais il plaide aussi pour des droits égaux pour tous les peuples. "Autant de langues on parle, autant de fois on est homme," a dit l’empereur Charles-Quint. Pourtant un homme n’a besoin, hors de son dialecte, que de deux langues: sa langue nationale et l’Espéranto, qui ne veut pas remplacer les langues nationales, comme pensent certains, mais servir de moyen de communication entre les gens qui n’ont pas la même langue maternelle.